

# Ni Ĉiuuj

Revuo de Meksika Esperanto Federacio

Speciala numero 1/2012

**“ESPERANTO - 125 JAROJN KUNIGANTE  
POPOLOJN; FRATIGANTE KULTUROJN”**



Prelegoj kaj prelegantoj  
Ludoj, kursoj, labortabloj  
Teatro, muziko kaj Esperanto



## **ANTAŬPAROLO**

Jam 125 jaroj pasis ekde la publikigo de la “Unua Libro”, verko per kiu Zamenhof diskonigis la internacian lingvon al la mondo, tamen ĉiuj scias ke 1887 ne estas la dato kiam tiu ĉi aventuro komenciĝis. Konstantan penadon, ekscitojn, esperojn, kaj multe da rifuzoj la kreinto de Esperanto spertis antaŭ la lingvo iĝis ilo por la internacia komunikado, tio estas, antaŭ ol sia revo ekrealiĝis.

Dum la historio, la disvolviĝo de la Esperanta komunumo estis malsama en diversaj landoj, pro geografiaj kialoj la “malnova” kontinento estis la unua en kiu la lingvo ekestis, tial la unuaj Esperantistoj de Eŭropo havis gravan rolon disvastigante la lingvon en la resto de la mondo. Tiel, kunigante popolojn, Esperanto venis al Meksiko en 1903 pere de la franco Anselmo Morin kaj per la kunlaboro kaj frateco de meksikano Ambrosio Vargas la movado en la lando ekis. Estis tempoj kun pozitivaj evoluoj kaj malbonaj momentoj. Fine ni alvenis al tiu ĉi 2012 kun kelkaj malfacilaĵoj sed kun kreskanta kvanto da homoj, kiuj interesiĝas pri la lingvo kaj pri la bazoj, sur kiuj kreiĝis la lingvo.

Tial Esperanto - 125 jarojn kunigante popolojn; fratigante kulturojn estas la ĉefa temo de la ĉi jara kongreso en nia lando. Kvankam ni dum la 12a Meksika Esperanto-Kongreso (MEK) ja parolos pri la jubileo, kompreneble ni okupiĝos pri la baldaŭa estonteco de la movado, ĉar sur ĝi konstruiĝos la bazo por ke futuraj generacioj povos sukcese festi pliajn jubileojn.

En ĉi numero de “Ni Ĉiuj” vi trovos ĉefe informojn pri la 12a MEK, kiu okazos en la bela urbo Querétaro, per “Ni Ĉiuj” la partoprenontoj, fizikaj kaj mensaj, ekscios pri tio, kio atendas nin: kursoj, labortabloj, prelegoj, ludado, kantado, distrado kaj, tre grave, fortigo de kunlaboro inter niaj teamanoj. “ĜUU NI ĈIUJ, ĜUU LA KONGRESON”!

Mallely Martínez Mateos  
Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

## **ENHAVO**

<i>ANTAŬPAROLO</i>	<b>2</b>
<b><i>PRI SANTIAGO DE QUERÉTARO</i></b>	<b>4</b>
<i>NIAJ KONGRESEJOJ</i>	<b>5</b>
<b><i>SALUTMESAĜOJ DE DIVERSAJ ESPERANTISTOJ DE LA MONDO</i></b>	<b>8</b>
<i>ĜENERALA PROGRAMO</i>	<b>11</b>
<b><i>PRI PRELEGOJ KAJ PRELEGANTOJ</i></b>	<b>15</b>
<i>KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEF, 2012</i>	<b>20</b>
<b><i>CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FME, 2012</i></b>	<b>21</b>
<i>INTERKONA VESPERO</i>	<b>22</b>
<b><i>PREPARADO DE KER-EKZAMENOJ</i></b>	<b>22</b>
<i>RAPIDA KURSO POR UNIVERSITATANOJ</i>	<b>23</b>
<b><i>CURSO RÁPIDO PARA UNIVERSITARIOS</i></b>	<b>23</b>
<i>LA ESPERO</i>	<b>24</b>
<b><i>KONVERSACIA KAJ LEGA RONDO POR KOMENCANTOJ</i></b>	<b>25</b>
<i>LUDSALONO</i>	<b>25</b>
<b><i>KION DIRAS LA LERNANTOJ</i></b>	<b>25</b>
<i>LABORTABLO POR INSTRUISTOJ KAJ INSTRUANTOJ DE ESPERANTO</i>	<b>26</b>
<b><i>LABORTABLO POR MEKSIKA ESPERANTO-JUNULARO</i></b>	<b>26</b>
<i>LA ARTA VESPERO</i>	<b>26</b>
<b><i>LIBROSERVO</i></b>	<b>28</b>

## PRI SANTIAGO DE QUERÉTARO

En la centra parto de Meksiko troviĝas la provinco Querétaro (Keretaro) (Mapo 1), ĝi estas proks. 200 kilometroj for de la ĉefurbo de la lando.

En la ĉefurbo de Querétaro, Santiago de Querétaro, estis pluraj gravaj okazaĵoj rilate al la historio de Meksiko, ekzemple, tie disvolviĝis grandparte la sendependa movado de la lando komence de la deknaŭa jarcento kaj en la dudeka tie estis proklamita la Politika Konstitucio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksiko.



Mapo 1. Jalisco - Guadalajara

Arkitekture Santiago de Querétaro havas gravan rolon; en 1996 la Historia Centro de la urbo estis deklarita de la UNESKO kiel kultura heredaĵo de la homaro, en ĝi troviĝas multaj civilaj kaj religiaj kontraŭaĵoj de la 17a kaj 18a jarcentoj. La Historia Centro konservas arkitektonikan

heredan kolekton de multaj generacioj, kiuj pligrandigis la urbon kaj kreis en ĝi mirindan belecon.

La vetero en la urbo estas ĝenerale milda, duonseka kaj kun varmaj someroj. La averaĝa temperaturo estas 18°C, la plej varmaj monatoj estas majo kaj junio, en kiuj la plej altaj temperaturoj atingas 36°C., aliflanke la plej malvarmaj estas decembro kaj januaro en kiuj la vetero povas esti ĝis 3°C.

Turisme Santiago de Querétaro estas tre alloga; en la urbo estas muzeoj, placoj, parkoj, ĝardenoj, preĝejoj, tradiciaj merkatoj, tradiciaj, naciaj kaj internaciaj restoracioj.



Foto 1. Akvedukto.

Inter la plej konataj turismaĵoj de Querétaro estas: Preĝejo kaj eksmonaĥejo de Sankta Francisko, la Akvedukto (Foto 1), la domo de la *Corregidora*, la Katedralo de *Querétaro*, Teatro de la Respubliko, Placo de Armiloj, Templo de



Foto 2. Muzeo de la Restarigo de la Respubliko.

Sankta Agustín, Muzeo de la Restarigo de la Respubliko (Foto 2), Muzeo kaj Domo de la *Zacatecana*, Ĝardeno Zenea, ktp.



## NIAJ KONGRESEJOJ

La **sidejoj** de la 12a MEK estos la instalaĵoj de la Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ), la plej grava publika edukinstitucio en tiu provinco, kaj la Universitato pri la Ideoj (UDEI).

En ambaŭ universitatoj aktivuloj de Querétaro komencis instrui Esperanton, en UAQ la agado ekis en 2010, kie Sergio Romero A. invitis la universitatanojn lerni la lingvon per lia helpo en liberaj kursoj. Pro tiuj kursoj estiĝis novaj, bonaj esperantoparolantoj, unu el ili estas Carlos Hernández L. kiu poste ankaŭ tie ekinstruis la lingvon kaj partoprenis kun aliaj lernantoj, lia instruisto kaj estraranoj – membroj de MEF en grava evento nomita: “XXIV Forumo de Universitataj Specialistoj pri Fremdaj Lingvoj”, tiam komenciĝis pli oficiala rilato inter la tieaj universitatoj kaj MEF.

Post daŭra kunlaboro inter tiuj institucioj kaj la agado de Sergio kaj Carlos, en la sekva jaro, la kursoj de Esperanto en UAQ fariĝis oficialaj kaj ofertataj en la Centro pri Lingvoj de tiu fakultato.

Nuntempe la agado tie sekvas, pro tio, “nia unua sidejo” gravas por tie diskonigi pli vaste la lingvon kaj apogi la instruistojn kaj gelernantojn de Esperanto. Grandan dankon ni donas al la antaŭa kaj la nuna direktorino de tiu fakultato, kiuj apogis kaj ĝis nun apogas la projekton. Dankon al María Eugenia Castillejos Solís kaj speciale al Verónica Núñez Perusquía, kiu nun ebligas al ni okazigi nian kongreson en UAQ.

Nia dua sidejo estas la Universitato pri la Ideoj (UDEI), ĝi estas relative nova eduka institucio, kiu malfermis sin al la publiko en 2011. Ĝiaj celoj estas ĉefe helpi en la kreado de profesiaj artistoj en la kampo nomata: “Nuntempa Konceptuala Arto” / “Arte Conceptual Contemporáneo”; fakoj, kiuj tie troviĝas estas: Reklam-grafika Dezajno kaj Desegno kaj Animado en 2D kaj 3D, krome oni tie ofertas trejnadkursojn pri ciferecigado kaj pentrado.

Esperanto eniris en tiun universitaton, en liberaj kursoj, dum tiu ĉi jaro pere de Carlos Hernández L., ĝia direktorino afable akceptis la proponon menciante ke iam ŝi eklernis la lingvon. Pro ŝia granda apogo kaj permeso okazigi nian kongreson en UDEI, ni sincere dankas al Roxana Ceballos Rodríguez.

La **adresoj** de niaj kongresejoj estas:

- Facultad de Lenguas y Letras de la Universidad Autónoma de Querétaro  
Anillo Vial Fray Junípero Serra S/N (malnova flughaveno de Querétaro)
- Universidad de las Ideas  
Av. Constituyentes Pte. 69 int. G. Col. Casa Blanca (apud hotelo “Casa Blanca” kaj “Laboratorios Polanco”)

## Kiel atingi la kongresejojn?

### 1) UAQ (Mapo 2):


- Eblas uzi la universitatan transporton, tamen sabate estas nur 1 veturado, ĝi ekas je la 7a kaj duono kaj atingas UAQ je la 8a. Vi povas preni ĝin en la ĉefa kampuso de UAQ aŭ ĉe la bushaltejoj sur Av. Universidad.
- Per publika transporto uzu la sekvajn busojn: #24, #78 aŭ la D. La 24an kaj la 78an vi povas preni sur la strato Corregidora, ili devas iri al "La Pradera", la D veturas sur Av. Constituyentes kaj sur Bernardo Quintana.
- Se vi preferas uzi taksion, bv. indiki la ŝoforon ke vi iras al UAQ ĉe la malnova flughaveno, kiu estas proksime de "La Pradera". Ekde la urbocentro la veturado kostos proks. sepdek meksikajn pesojn.

### 2) UDEI (Mapo 3):

- De la "Alameda", en la historia Centro, al nia kongresejo estas proks. 1 kilometro for, vi povas iri piede, preni taksion aŭ uzi iun ajn aŭtobuson, kiu veturas sur la Av. Constituyentes.



Mapo 2. Lokiĝo de UAQ, kampuso Aeropuerto, nia sidejo 1.



Mapo 3. Lokiĝo de UDEI, nia sidejo 2.

## **SALUTMESAĜOJ DE ESPERANTISTOJ DE LA MONDO**

- En la nomo de Universala Esperanto-Asocio kaj en mia propra, mi salutas la 12an Meksikan Esperanto-Kongreson, kiu de la 16a ĝis la 19a de novembro 2012 en la urbo Querétaro okupiĝos pri la temo “125 jarojn kunigante popolojn, fratigante kulturojn”.

Kiel vi scias, mi estas homo el suda lando, kaj ofte emfazas mian apartenon kaj la fakton, ke la komunikaj fluoj en la Esperanta movado tro ofte allasas, ke la nordlandanoj malpli lernu pri la sudlandanoj, ol inverse. La fakto, ke ni lastatempe okazigis Universalajn Kongresojn en Havano kaj Hanojo, kaj ke ni baldaŭ UKos en Bonaero, sendube donas okazon por klopodi renversi la malsimetrion. Sed, kiel Renato Corsetti lastatempe atentigis, la sudlandanoj devas eksplicite batali por tiu celo kaj ne atendi, ke la nordlandanoj de si mem malavare donacos sian tempon kaj atenton al ni en la sudo.

Mi permesas al mi citi jenajn vortojn de Octavio Paz, kiu vortigas tre klare sian propran tezon kaj la respondon al la problemo prezentita je la komenco de la eseo. Li skribas: *‘La meksiklandano ne volas esti indiĝeno nek hispano. Nek volas li deveni de ili. Li neas ilin. Kaj li ne jesas sin mem kiel miks-rasulon sed kiel abstraktaĵon: li estas homo. Li iĝas filo de la nenio. Li komenciĝas en si mem.’* Kaj poste: *‘La meksiklandano kaj la meksiklandaneco estas difinataj kiel rompadaj kaj neado.’*<sup>1</sup>

Mi citas tiujn vortojn ne nur por povi esprimi la esperon, ke ili inspiras vin diri ion propran kaj originalan de la flanko de la meksikaj esperantistoj. Mi citas ilin ankaŭ kiel okazon por informi vin, ke Octavio Paz estis ambasadoro de Meksiko en Barato, kaj ke ni admire legas liajn verkojn. Mi estas granda ŝatanto de lia verko *La labirinto de la soleco* kaj volonte relegus ĝin en Esperanta redono kun suplementaj notoj, kiuj esprimus proprajn pripensojn de la tradukanta esperantisto meksika. Komprenoble, povas ja esti, ke vi preferos traduki aliajn verkojn de tiu ege talenta verkisto. Bondeziras,

**Probal Dasgupta**, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

---

<sup>1</sup> El la retpaĝo <http://laverdalacerteto.blogspot.in/2012/10/octavio-paz-la-filoj-de-la-malinceo.html>



- Karaj partoprenantoj de la meksika Esperanto-kongreso, vi estas la vivanta pruvo pri tio, kion mi predikas de jardekoj: por disvastigi Esperanton oni devas labori kaj oni devas labori konkrete kaj surloke.

La Esperanto-movado estas plena je homoj kiel mi, kiuj kapablas pensi grandajn ideojn, kiujn aliaj homoj devos efektiviĝi. Oni certe scias kaj diras, kion devus fari UN kaj Unesco por progresigi Esperanton. Oni povas facile pensi, kion faru Obama samcele, ktp. Sed samtempe la Esperanto-movado estas plena je homoj malkapablaj paroli kun la loka vicurbestro kaj malfermi Esperanto-kurson en la loka publika biblioteko.

Oni kapablas reŝi pri triumfo en Bruselo ĉe la Eŭropa Unio sed oni malkapablas paroli al la loka federisma klubo. Kelkaj teoriuloj pri la “fina malvenko” eĉ provizas teorion bazon pri la senutileco de tia laboro. Finfine la angla jam venkis. Ni adaptiĝu al tio kaj pluflegu niajn malgrandajn niĉojn, kiel faras ĉiuj hobiuloj pri kartludado, kiuj certe ne klopodas influi la mondon sed restas trankvile en siaj kluboj.

La ekesto de relative forta kaj agema Esperanto-asocio en Meksiko dum la lastaj jaroj pravas, ke loka laboro funkcias kaj alportas esperantistojn. Esence tiu loka laboro konsistas el informado kaj instruado. Oni povas ŝanĝi la nomojn de tiuj du agadoj, sed daŭre la laboro restas sama.

Nuntempe la mondo ŝanĝiĝas. Ne estas dubo pri tio. Dum mi verkas ĉi tiujn liniojn, mi aŭdas de la radio, ke la fama usona revuo Newsweek ne plu estos presata sed aperos nur rete. Tio, tamen, ŝanĝas nur la ilojn, per kiuj oni agu, ne la enhavon de la agoj mem. Ankaŭ en la estonta tempo oni devos informi kaj instrui, sed oni devos fari tion rete. Ankaŭ la organizado de esperantistoj eble baziĝos pli kaj pli sur la reto, sed tio ne forigos la neceson, ke iu faru ion por kunteni la meksikajn lernintojn kaj fari el ili ageman komunumon.

En multaj landoj oni ankoraŭ ne komprenas tion, kaj daŭre atendas ke nia blanka kavaliro triumfos en Bruselo, ke la prezidanto de la Eŭropa Unio eklernos Esperanton kaj ke ĉiuj eŭropanoj sekve konvertiĝos. Bedaŭrinde tio okazis en la Meza Epoko, sed jam estas tempo foriri el tiu fabela tempo kaj imiti la lokan konkretan agadon de la meksikaj aktivuloj.

Pro tio, karaj kongresanoj, mi ege bedaŭras ne povi esti inter vi, kaj mi tre varme salutas vin kaj bondeziras al via kongreso grandan sukceson!

**Renato Corsetti**, Eksa prezidanto de UEA.



- Karaj partoprenantoj de la kongreso de MEF en Novembro 2012, Mi deziras al vi agrablajn, bonetosajn kaj laboremajn tagojn kaj klerajn decidojn kaj elektojn dum la Jarkunsido de MEF. En miaj pensoj mi partoprenas vian kongreson kaj gratulas ĉiujn, kiuj faris KER-Ekzamenon, kompreneble ankaŭ instigas ĉiujn plibonigi sian lingvoscion.

Samideane, **Synnöve Mynttinen**, Finnlando



### **Instigaj jaroj por via kontinento**

- Nome de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, mi kore salutas la meksikan Esperanto-kongreson. Ni ĝojis ricevi raportojn pri bravaj iniciatoj instrui la lingvon en viaj universitataj rondoj, kaj povi bonvenigi meksikan sekcion de ILEI en niajn rondojn en 2011. Tiu sekcio estas nur nia tria en latinameriko, do ILEI havas grandan defion kaj mision vastigi sian agadon tra la ceteraj landoj de la kontinento. Tiuj ekzistantaj sekcioj povos ludi gvidan rolon en la malfermo kaj fortigo de instrua agado en pliaj landoj. Tio aparte validas pri latinameriko, ĉar vi havas unu ĉefan komunan lingvon, el kiu vi devas instrui nian lingvon. Estas granda potencialo por kunlabori pri la kreo de optimuma didaktiko por efike kaj moderne instrui Esperanton al hispan-lingvanoj. Kial vi ĉiuj landon post lando foruzi rimedojn por plenumi similan taskon? ILEI devos proponi ombrelon, ene de kiu tia kunlaboro povos flori.

La demando aparte aktualas, ĉar en 2014 la Universala Kongreso venas denove al via kontinento, kaj ILEI aktive esploras la eblojn same veni al sudameriko. Memoru, ke tra la lastaj ses jaroj, kvar el niaj konferencoj okazis ekster-eŭrope. Vi atendu, ke tio fariĝos la normo.

Konklude, ni deziras ke via programo estu bunta kaj valora, ke la partoprenantoj kontentu pri la kongresa partopreno, kaj naskiĝu bonaj kaj konkretaj planoj por intensigi la edukan laboron enlande kaj tra via tuta mondparto.

**Stefan MacGill**, Prezidanto de ILEI

## **ĜENERALA PROGRAMO<sup>2</sup>**

### **Laŭtaga Programo**

#### **Vendrede, la 16an de novembro**

- 18:00 – 20:00hr. Akcepto de partoprenantoj / Restoracio “*La Taruga*”  
18:00 – 21:00hr. Interkona vespero / Restoracio “*La Taruga*”  
18:00 – 21:00hr. Libroservo / Restoracio “*La Taruga*”

#### **Sidejo 1: Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro**

#### **Sabate, la 17an de novembro**

- 09:00 – 10:00hr. Akcepto de partoprenantoj / Salono 9 – WARINGHIEN  
Libroservo / Salono 9 – WARINGHIEN
- 10:00 – 11:00hr. Inaŭguro / Audejo de “*Teca*” – AULD
- 11:15 – 12:00hr. Prelego 1: **“Kiel difini la sinsekvon de kurso, niveloj aranĝendaj je ĉiu lernpaŝo”** / Salono 10 – HODLER  
Carlos F. Hernández L.
- 11:15 – 12:00 hr. Prelego 2: **“Esperanto 125 jarojn: kunigante popolojn, fratigante kulturojn”** / Salono 11 – ZAMENHOF  
Fidel Figueroa M.
- 11:15 – 13:45hr. Libroservo / Salono 9 – WARINGHIEN
- 12:00 – 12:45hr. Prelego 3: **“Querétaro dum la ekzistado de Zamenhof”** / Salono 1 – LAPENNA  
Sergio Romero A.

---

<sup>2</sup> Ekstre la ĉeestantaj partoprenantoj ricevos grafikan programon.

- 12:00 – 13:45hr. Kurso por prepari skribajn ekzamenojn de KER / Salono 11 - ZAMENHOF  
Mallely Martínez M.
- 12:45 – 13:45hr. Kanto de la himno “La espero” – praktiko, parkera kantado kaj ekzameniĝo / Salono 1 - LAPENNA  
Joaquín Rosillo V. kaj Guadalupe Vega Acosta
- 13:10 – 13:45hr. Prelego 4: “**El Esperanto, comunicación e interculturalidad**” / Salono 10 - HODLER  
David López R. kaj Martin Schäffer
- 13:45 – 15:15hr. Tagmanĝo
- 14:15 – 15:45hr. Rapida kurso por universitatanoj de UAQ / Salón 10 - HODLER  
Martin Schäffer
- 15:15 – 16:15hr. Ludsalono: diversaj tabloludoj por interagi kaj lerni Esperanton 1 / Salono 1 – LAPENNA kaj salono 11 - ZAMENHOF  
Víctor Cesni B., Margarita Lee O., Llovana Martínez M. kaj Guadalupe Vega Acosta
- 16:15 – 19:00hr. Ĝenerala Asembleo de Meksika Esperanto Federacio / Salono 11 - ZAMENHOF

## **Sidejo 2: Universitato pri la Ideoj**

### **Dimanĉe, la 18an de novembro**

- 09:30 – 10:15hr. Prelego 5: “**Esperanto – 125 jaroj**” / Salono 1 - GRABOWSKI  
Martin Schäffer
- 09:30 – 10:15hr. Prelego 6: “**La fenomeno de planlingvoj**” / Audejo UDEI - ZAMENHOF

- Sergio Romero A.
- 09:30 – 10:15hr. Prelego 7: **“El Esperanto, comunicación e interculturalidad”** / Salono 2 - CSEH
- David López R.
- 10:15 – 11:00hr. Prelego 8: **“La vivo de Lidja Zamenhof kaj la samideanoj nuntempe... kion farus Lidia?”** / Salono 1  
- GRABOWSKI
- Araceli Aguilar
- 10:15 – 11:00hr Prelego 9: **“Ni forigu Esperanton el Esperantista bobelo”** / Audejo UDEI - ZAMENHOF
- Carlos F. Hernández L
- 10:15 – 11:45hr. Rapida kurso de Esperanto por universitatanoj de UDEI kaj ĝenerala publiko / Salono 2 - CSEH
- Erika Juárez M.
- 11:00 – 12:00hr. Konversacia kaj lega rondo por komencantoj 1 / Audejo UDEI - ZAMENHOF
- Llovana Martínez M. kaj Daniel Moreno M.
- 11:45 – 12:45hr. Labortablo por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto, interŝanĝo de spertoj kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj / Salono 1 - GRABOWSKI
- Carlos Hernández L. kaj Edgar López B.
- 12:00 – 12:45hr. Mi kiel lernanto: kion mi proponas kaj esperas de ĉeestantaj kursoj de Esperanto? / Auditorio UDEI - ZAMENHOF
- Araceli Aguilar kaj Raúl Antoniano M.
- 12:15 – 14:00hr. Libroservo / Salono 2 - CSEH
- 12:45 – 13:00hr. Kafpaŭzo

- 13:00 – 14:00hr      Labortablo por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto,  
kion diras la lernantoj? / Salono 1 - GRABOWSKI  
Araceli Aguilar kaj Raúl Antoniano M.
- 13:00 – 14:00hr.      Ludsalono: diversaj tabloludoj por interagi kaj lerni  
Esperanton 2 / Auditorio UDEI - ZAMENHOF  
V́ctor Cesni B., Alejandro Herńandez R., Areli Śnchez
- 14:00 – 15:30hr.      Tagmanĝo
- 15:30 - 16:45hr.      Konversacia kaj lega rondo por komencantoj / Salono 1 -  
GRABOWSKI  
Llovana Mart́nez M. kaj Daniel Moreno M.
- 15:30 - 16:45hr.      Kurso por prepari buŝajn ekzamenojn de KER / Salono 2  
- CSEH  
Mallely Mart́nez M. kaj Guadalupe Vega Acosta
- 15:30 - 16:45hr.      Meksika Esperanta Junularo (MEJ): kien ni iros? / salono  
3 - BAGHY  
David Ĺpez R. kaj Sergio Romero A.
- 17:00 – 19:30hr.      Arta Vespero / Audejo UDEI - ZAMENHOF

### **Lundo, 19an de novembro**

- 09:00 – 10:00hr.      Solena fermo / Audejo UDEI - ZAMENHOF
- 09:00 – 10:00hr.      Libroservo / salono 2 - CSEH
- 10:30 –                      Ekskurso al *Peña de Bernal* / ekster la sidejoj.

## **PRI PRELEGOJ KAJ PRELEGANTOJ**

En tiu ĉi parto vi trovos informojn pri la prezentotaj prelegoj kaj prelegontoj en la 12a MEK. Atentu ke estos prelegoj, kiuj okazos samtempe, pro tio ni rekomendas vin legi la resumojn por havi ĝeneralan superrigardon kaj decidi kiun vi partoprenos. La ordo estas alfabete laŭ la familia nomo de la prelegontoj.



**Prelego #8: “La vivo de Lidja Zamenhof kaj la samideanoj nuntempe... kion farus Lidia?”**

**AGUILAR Y AGUILAR Araceli** naskiĝis en Veracruz, Meksiko, en 1965. Ŝi estas informadikistino, poste ŝi studis psikobioenergion, homeopation, reikon, universalan energion kaj hipnozisman. Ŝi esperantiĝis en 2011.

**Resumo:** Lidja Zamenhof estis la plej juna filino de la kreinto de la internacia lingvo, Esperanto. Se ŝi vivus nuntempe kion ŝi farus por disvastigi la lingvon?, ĉi tiun demandon disertos la prelegonto prenante kiel ekzemplon kion Lidja dum sia vivo faris por Esperanto. Ŝiaj agadoj estas ekzemploj por la tuta homaro sed speciale por tiuj, kiuj nomas sin esperantistoj.



**Prelego #1: "Kiel difini la sinsekvon de kurso, niveloj aranĝendaj je ĉiu lernpaŝo"**

**HERNÁNDEZ LOARCA Carlos Fernando** naskiĝis en Querétaro en 1991, li estas studanto en la kariero de Modernaj Lingvoj kun specialiĝo en Hispana lingvo. Li esperantiĝis en 2010 kaj ekde tiam li aktivas en loka kaj nacia

esperantista movado, ĉefe instruante la lingvon kaj aranĝante renkontiĝojn. En 2011 li iĝis prezidanto de la meksika sekcio de ILEI - Meksikaj Esperantistaj Instruistoj, kaj membro de la estraro de MEJ - Meksika Esperanto Junularo. Li ŝatas promeni ĉe la plaĝo kaj la malvarmajn noktojn.

**Resumo:** Bazita en la aktualigo de *Peace Corps* por instrui la hispanan (kaj aliajn lingvojn) laŭ tre strikta kadro kiu indikas tre specifan manieron difini je kiu nivelo troviĝas la gelernantoj kaj en

kiun nivelon ili devas tuj iri. Ankaŭ ĉi tiu sistemo konkrete indikas la konojn jam pasintajn de la gelernantoj en ĉiu nivelo. Perfekta ilo por scii kiel aranĝi kursojn kaj kiel irigi ilin laŭ fajna vojo.



### Prelego #9: "Ni forigu Esperanton el Esperantista bobelo"

**Resumo:** Post propra sperto da esperantistaj agadistoj, kelkaj homoj opinias ke Esperanto estas sektisma, religia, nelerninda afero. Do, kiel plibonigi la ideon de Esperanto al ne-Esperantistoj?

Kiel ni povus aranĝi manieron trafi ilin kaj lasi en ili satigan senton pri Esperanto? Nu, kelkaj ideoj aperis kaj kompreneble kelkaj aliaj aperos dum ĉi tiu prelego.



### Prelego #2: "Esperanto 125 jarojn: kunigante popolojn, fratigante kulturojn"

**FIGUEROA MARTÍNEZ Fidel** naskiĝis en la ŝtato Michoacán; Meksiko, en 1926, li estas Kemia Inĝeniero, 25 jarojn laboris ĉe la sukera industrio, kie li desegnis kaj muntis du fabrikojn. Li estis profesoro en la UNAM dum dek ses semestroj. Esperantiĝis en 1954 helpe de Tibor Sekelj. Partoprenis en 9 UK; 4 TAKE kaj 4 Naciaj Kongresoj. Publikigis artikolon en "Scienca Revuo", kaj alian en la Komuna Libro "Nova Jarmilo". Por omaĝi la Centjariĝon de



Esperanto, organizis diversajn eventojn en Meksiko: intervjuoj en radio kaj TV, prelegoj kaj ekspozicioj; precipe, kune kun sinjorino Guadalupe Vega, en “Foro Cultural Coyoacanense”, sukcesan feston, kun partopreno de la Ambasadoro kaj 2 Ataŝeoj el Pollando kaj alia el Austrio, krom la Representanto de UNESKO.

**Resumo:** Mi mem, jam 58 jarojn kuniĝante al popoloj, fratiĝante kun personoj. Komence, en 1954 mi alproksimiĝis al tutmondaj kulturoj, al pluraj landoj; tion ĉi, precipe pere de centoj da leter-geamikoj; sed ankaŭ aliĝinte al deko da asocioj, tamen avide legante librojn kaj revuojn. Poste alilande prakti-

kante nian lingvon, amikiĝante personojn; jam ekde 1957 partoprenis Universalajn Kongresojn de U.E.A. krom aliajn, ĉu regionajn, ĉu naciajn. Nun, peze ŝarĝata de tiom da esperantaj plezuroj kaj rememoroj, mi venas al vi kun tiuj ĉi memoraĵoj por lotumi ilin inter la partoprenantoj.



#### **Prelego #4 kaj #7: “El Esperanto, comunicación e interculturalidad”**

**LÓPEZ RUEDA David** naskiĝis en la urbo de San Luis Potosí en 1986. Li finis siajn universitatajn studojn pri edukado pri fremdaj lingvoj kaj laboras kiel instruisto pri la angla lingvo. Li esperantiĝis en 2007 kaj ekde tiam li partoprenas diversajn naciajn kaj internaciajn Esperantistajn renkontiĝojn. En la jaro 2008 li estis elektita kiel estrarano de Meksika Esperanto Federacio.

**Resumo:** El idioma esperanto fue creado en 1887 por el médico polaco Ludwig Zamenhof con el objetivo de facilitar la comunicación internacional de una manera neutral, desde ese

entonces hasta nuestros días el esperanto ha ido ganando terreno en diversos ámbitos, por ejemplo, la lengua es reconocida por UNESCO desde 1954, es posible certificar los conocimientos del idioma dentro del

Marco Común Europeo para las lenguas, en el mundo virtual sitios y aplicaciones como wikipedia, google y facebook tienen versiones en esperanto. Actualmente el esperanto es ha-

blado en más de 120 países alrededor del mundo, por lo que el hablante tiene la ventaja de acercarse a diversas culturas desarrollando una competencia intercultural.



### Prelego #3: "Querétaro dum la ekzistado de Zamenhof"

**ROMERO ALDANA Sergio** naskiĝis en la ĉefurbo de Meksiko en 1987. Li studis lingvistikon kaj hispanlingvan literaturon, li laboras kiel instruisto de la portugala. Li esperantiĝis en 2006 kaj ekde 2010 li instruas Esperanton en la ŝtata universitato.

**Resumo:** Querétaro havis gravan rolon, diversepoke, en la historio de Meksiko. Aliflanke, en la mondo de Zamenhof, Eŭropo ankaŭ vidis multajn kaj profundajn ŝanĝojn. Kio okazis en Querétaro dum Zamenhof elpensis kaj kreis Esperanton? Dum Zamenhof travi-

vis plezurojn kaj dolorojn, kiu estis la situacio de ĉi fora urbo? La prelego faras komparon inter du tre malsimilaj scenejoj kiuj, subite, tuŝas unu la alian dum nia atendata kongreso. De la naskiĝo ĝis la morto de Zamenhof, de la militoj ĝis la meksika konstitucio en Querétaro.



### Prelego #6: "La fenomeno de planlingvoj"

**Resumo:** Esperanto estas sendube la plej sukcesa planlingvo en la mondo, sed ankaŭ ekzistas

miloj da aliaj planlingvoj, kelkaj konataj, kelkaj forgesitaj. La nombro de planlingvoj estas kurioze granda

sed malofte iu planlingvo uziĝis kaj akademie estas apenaŭ reserĉita. furoris samkiel Esperanto, kelkaj Kio estas la diferenco inter eĉ estis kreitaj laŭ malsamaj celoj. Esperanto kaj aliaj planlingvoj?, kiaj Vasta klasifiko ekzistas por planlingvoj ekzistas? Ĉi prelego kompreni tiajn lingvojn, tamen, montras la buntecon en la mondo estas temo pri kiu malmultaj homoj de planlingvoj. parolas (ĉefe Esperantistoj), kaj



### Prelego #5: "Esperanto – 125 jaroj"

**SCHÄFFER Martin** naskiĝis dum la jaro 1962 en la germana urbo Duisburg. Li diplomiĝis pri "publika administrado" ĉe ŝtata faklernejo. Esperanton li lernis en 1982. Relative baldaŭ li komencis esti aktiva en la Esperanto-movado kaj li laboris por plej diversaj celoj kaj organizaĵoj. Li momente laboras, kiel ĝenerala sekretario de Germana Esperanto-Asocio, sed multe helpas al la movado en Meksiko.

**Resumo:** La unua libro pri ni rigardos la aktualan staton de la Esperanto aperis en la rusa lingvo ni ankaŭ provas je la 26-a de julio 1887, do ĉi-jare diskuti la demandon, ĉu Esperanto ni festis la jubileon Esperanto – finfine estis sukcesa lingvo aŭ ĉu ĝi 125 jaroj. Dum la prelego ni fiaskis, kiel diras kelkaj kontraŭuloj. aŭskultos pri Esperanto-historio kaj



## **KUNVOKO AL ĜENERALA ASEMBLEO DE MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO, 2012**

MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO invitas ĉiujn siajn anojn al asembleo, kiu okazos la 17an de novembro 2012 je la 16a kaj 45 en la salono 11 de la Fakultato pri Lingvoj de la Universidad Autónoma de Querétaro, kies adreso estas: Anillo Vial Fray Junípero Serra, antikva flughaveno de Querétaro, Querétaro. La asembleo okazos laŭ la prezentata:

### **Tagordo:**

- 1.- Malfermo kaj listo de anoj ĉeestantaj kaj aprobo de la tagordo.
- 2.- Estrara jara raporto.
3. Elekto de la nova estraro de Meksika Esperanto Federacio por la periodo 2012-2016.
- 4.- Ĝeneralaj aferoj:
  - a) Laborplano.
  - b) Esploro pri la sidejo de la venonta nacia kongreso.

Meksikurbo, je la 20a de oktobro 2012.



20.10.2012

Mallely Martínez Mateos  
Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

## **CONVOCATORIA A LA ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, A.C. 2012**

LA FEDERACIÓN MEXICANA DE ESPERANTO, ASOCIACIÓN CIVIL, convoca a todos los asociados a la asamblea general que se celebrará el día 17 de noviembre de 2012, a las 16:45 horas, en el salón #11 de la Facultad de Lenguas y Letras de la Universidad Autónoma de Querétaro, que se encuentra en Anillo Vial Fray Junípero Serra, antiguo aeropuerto de Querétaro, Querétaro. La asamblea se sujetará al siguiente:

### **Orden del día:**

- 1.- Inauguración, lista de presente de los asociados y aprobación de la orden del día.
- 2.- Reporte anual de la directiva.
- 3.- Elección de la nueva directiva de la Federación Mexicana de Esperanto AC. para el período 2012-2016.
- 3.- Asuntos generales:
  - a) Plan de trabajo.
  - b) Exploración de la sede del próximo congreso nacional.

México, D.F., a 20 de octubre de 2011.



20.10.2011


Mallely Martínez Mateos  
Presidenta de la Federación Mexicana de Esperanto, A.C.

## INTERKONA VESPERO



Ofte dum la kongresoj, ne eblas paroli kun ĉiuj homoj ĉar al ili venas novuloj, kiuj ne konas aliajn esperantoparolantojn, kiuj eble estas timidaj aŭ timas ekuzi la lingvon, aŭ simple ĉar la kongresprogramo estas plenplena kaj ne eblas trovi momentojn por pli profunde interkonatiĝi. Tial la celo de la INTERKONA VESPERO estas, kiel ni diras en Meksiko, “rompi la glacieron” inter la partoprenantoj, tio estas, fari ion por konstrui amikeman etoson kaj tiel sentigi la homojn malstreĉitaj kaj kun la emo integri sin al la grupo.

Gravas mencii ke tiu aktiveco ne estas nur por kongresanoj, sed por aliaj esperantoparolantoj kaj interesitoj pri la lingvo. Do venu kaj invitu aliajn homojn pasi agrablan vesperon en la restoracio “La Taruga”, kiu estas en: Av. Universidad Pte. #37 A. Inter Ezequiel Montes kaj Ocampo. Centro, Santiago de Querétaro.



### PREPARADO DE KER - EKZAMENOJ



Junie ĉijare okazis Tutmonda Skriba KER-ekzameno pri Esperanto, al kiu aliĝis pli ol 350 homoj el 29 urboj kaj 19 landoj, agrable estis por ĉiuj ke el Meksiko aliĝis 48 personoj, kiuj ekzameniĝis en du urboj: Tecámac kaj Tijuana.

Pluraj meksikanoj certe volos ankaŭ vivi tiun sperton kaj havi oficialan atestilon pri siaj Esperantaj konoj. Ni ekprepariĝu por fari ne nur tian ekzamenon sed ankaŭ la buŝan. Meksika Esperanto Federacio planas

okazigi venontjare en la lando tiujn ekzamenojn apogate de rajtigitaj ekzamenantoj.

Eble vi demandos vin kial indas fari la ekzamenon? Movade utilos ĉar vi kontribuos en la monda statistiko donante tiel pli da prestiĝo kaj seriozeco al Esperanto. Persone, vi certe multe plibonigos viajn konojn preparante vin por la testo, aliflanke vi havos oficialan dokumenton, kiun vi povus uzi por profesiaj aŭ lernejoj aferoj.

La sekreto por sukcesi estas bone lerni, bone koni la strategiojn, kiujn oni devas uzi. En tiuj ĉi kursoj vi akiros diversajn informojn pri kiel akiri lertecon, sed memoru...! Ĉi tio estos nur la komenciĝo, poste vi devas daŭradi la ekzercadon.



## RAPIDA CORSO POR UNIVERSITATANOJ

Ĉar nia celo estas ne nur kunveni, praktiki la lingvon, aŭdi prelegojn, kundividi spertojn ene de esperantoparolantoj, sed disvastigi Esperanton kaj allogi novajn membrojn al nia teamo, ni dum la 12a MEK ofertas al studentoj de niaj kongresejoj proveti la facilecon kaj efiko de la lingvo pere de a) informprelego kaj b) rapida kurso. Kvankam la kurso estas ĉefe por universitatoj, ni ankaŭ informis al la ĝenerala publiko. Jen sube iom da informoj por la partoprenantoj.

## CURSO RÁPIDO PARA UNIVERSITARIOS

Con el afán de compartir las ventajas de aprender del Idioma Internacional Esperanto con los universitarios de nuestras sedes, hemos programado, por un lado,

una ponencia que proporcionará información general sobre el esperanto, por otro, un curso rápido que permitirá adquirir algunos conocimientos básicos del idioma, de tal manera que el asistente podrá tener elementos para



aventurarse, más adelante a iniciar un curso virtual o presencial. ¡Aprovecha!  
No hay cuota de participación.



## LA ESPERO



Devige ĉiu esperantoparolanto devas koni almenaŭ ke  
La Espero estas la himno de Esperanto, ĝin verkis  
Zamenhof kaj en ĝi li inkluzivis pensojn kaj sentojn sur  
kiuj la lingvo estis kreita.

Dum la pasita 97a UK en Vjetnamio, la meksikanoj Joaquín Rosillo kaj  
Guadalupe Vega Acosta sukcesis ekzamenon pri parkera kantado de “La  
Espero” tial ili apartenas al la “Societo parkere kanti la himnon” kaj nun rajtas  
ekzameni novajn kantistojn.

Tiuj kongresanoj, kiuj dum la 12a MEK sukcesos en la ekzameno ricevos  
retan atestilon kadre de sro. Hori Jasuo el Japanio, eksestrarano de  
Universala Esperanto Asocio kaj ĉefa fondinto de la societo en 2009.

### LA ESPERO (L. L: Zamenhof)

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko:  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta amo disbatitaj.

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion,  
Al la mond´ eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.

Sub la sankta signo de l´ espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos  
Ĝis la bela song´ del' homaro  
Por eterna ben´ efektivigoj.





## KONVERSACIA KAJ LEGA RONDO POR KOMENCANTOJ



Dum tiu ĉi aktiveco la ĉeestantoj povos sekvi la praktikadon de la lingvo per la helpo de facila materialo, kiu provizas al ili elementojn ne nur por kreskigi la lingvajn konojn sed ankaŭ por konscii ke ĉiuj iam estis komencantoj kaj ke la plej granda limo estas oni mem. Perdi timon, amikiĝi kaj kunlerni estos la rezulto de tiu rondo.



## LUDSALONO



Pluraj instruistoj ne nur pri lingvoj sed pri diversaj fakoj scias ke unu el la plej bonaj manieroj lerni estas kiam oni ŝatas la lernaĵon kaj se oni amuziĝas farante tion, la sperto iĝas ankoraŭ pli efika. La uzo de ludoj do estas bonegaj lerniloj, ĉar oni interagas, parolas kaj ĝuas kvazaŭ infanoj.

Dum la 12a MEK la kongresanoj trovos diversajn tabloludojn por lerni novajn vortojn, gramatikaĵojn, konstruon de frazoj, ktp., je diversaj niveloj: de komencantoj ĝis progresantoj. Partoprenu kaj ŝtelu kelkajn ideojn por havi vian propran materialon ĉu por la memlernado, ĉu por la instruado.



## KION DIRAS LA LERNANTOJ?


Ofte la lernantoj estas kiuj sidiĝas, aŭskultas, sekvas la klason de la instruisto kaj lasas sin esti gvidataj. Tamen ili havas propran opinion pri la instruado de la gvidanto, ĉu bona, ĉu ne tiom bona... Tiu ĉi kunveno estos bona okazo por esprimi tiujn pensojn kaj fari rekomendojn al la instruistoj, kiuj certe tre dankos pro tiuj informoj ĉar tiel ili povos konscii pri la bonaĵoj kaj ne tro bonaj flankoj de sia agado. La labortablo estos gvidata de lernantoj, kiuj poste, sen diri nomojn, raportos al la kongresanaj instruistoj pri la afero.



## **LABORTABLO POR INSTRUISTOJ KAJ INSTRUANTOJ DE ESPERANTO**

La ĉefa celo de tiu kunveno estas interŝanĝi spertojn rilate al la instruado de Esperanto ĉu per la reto, ĉe en ĉeestantaj kursoj. Ĉar certe partoprenos homoj, kiuj ekis tiun agadon antaŭnelonge, por ĉiuj estos interese aŭdi pri tio kaj respondi al demandoj, kiujn certe ili havas, kundividi materialon kaj rekomendi instruilojn ankaŭ estos parto de tiu laborgrupo.

En tiu ĉi kongresero, ankaŭ oni parolos pri la stato de la ILEI sekcio en Meksiko kaj decidos kiel sekvos la planoj kaj ĝia organizado. En la dua sesio la instruistoj / instruantoj pliriĉigos sian scion aŭdante kion la lernantoj opinias pri la instruado de Esperanto kaj kion ili rekomendas.



## **LABORTABLO POR MEKSIKA ESPERANTO JUNULARO**



**MEJ**

MEMBRARO ESPERANTO - AMSTERDAMO

Dum la lasta Meksika Esperanto Kongreso rekreiĝis oficiale la landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en nia lando: “Meksika Esperanto Junularo” (MEJ), kies estroj estas: Sergio Romero, David López, Ulises Franco, Edgar López kaj Carlos Hernández. Ĉiu el ili ludis ĝis nun gravan rolon diversmaniere en la nacia ĝenerala movado, tamen nepras ke ili parolu pri MEJ antaŭ novaj meksikaj gejunuloj, reorganiziĝu kaj faru planojn por la estonteco. Ni invitas vin partopreni. LA JUNULARO EGE GRAVAS POR LA MOVADO MONDE!



## **LA ARTA VESPERO**

Esperanto kaj kulturo estas ege ligitaj, pro tio la arta vespero estas ĉefa programero en ĉiu kongreso, ĝi donas al ni plezuron kaj konigas al ni parton de kulturo, ĉu nacia, ĉu internacia. Dum la 12a Meksika Esperanto-

**NI ĈIUJ: 1/2012**

Kongreso, ni havos partoprenon de artistoj, kiuj dividos kun ni sian talenton kaj transportos nin al la magia mondo de la teatro, danco kaj muziko.

1) Duetto de fagotoj: Ni aŭskultos la agrablajn tonojn de tiu bela muzikilo kadre de la profesiuloj Armando Hernández Tellez (**fagotisto** de la Teatro de “Bellas Artes”), Ana Lilia López Díaz (**fagotistino** de la Nacia Lernejo pri Muziko de la UNAM).



2) Meksika folkloro danco: ĉar en meksika aranĝo devas esti io tradicia, dum la arta evento partoprenos Llovana Martínez Mateos kaj Víctor Cesni Baños, kiuj per la karakteriza ĝojo kaj bunteco de la meksikanoj memorigos nin kiom riĉa estas niaj kulturo.



3) La grupo de teatro “YASÚ” de la *Facultad de Estudios Superiores* de UNAM – Aragón partoprenos per la teatraĵo: “Melankolioj”. Aktoras: Karen Tayde González Vera, Abra-



ham Maldonado Parra, Marilú Ri-vera Mora, José Eduardo “Lulo” Platas Ramírez, Bianka Jimena Estrada Morales, Diana Estela Cerón Nava. Reĝisoras: Erika Gabriela Juárez Maldonado.



4) Ĵaza muzikgrupo “*Angelas Productions*”: kompleta muzika repertuaro ekstraktita el la ekskluziva internacia riĉo, kie manifestiĝas la preparado, studoj, esploroj kaj ĉiu-taga praktiko el ĉiuj kampoj, ekde komponistoj ĝis ludantoj, kie abundas la iluzioj, plaĉo, profesiismo kaj la deziro elmontri sin. Ĝia vivprotokolo datiĝas de pli ol 20 jaroj de profesia sperto,

konstantaj studoj tie ĉi kaj eksterlande. “ĵazo multlingve kaj ĉiu manifestaĵo” estas tio, kion tiu grupo donacos al ni dum sia partopreno. Jorge



Estrada Avendaño (Pianisto), Roubén Olvera (Baskitaristo), Dagoberto Quintana (Drumisto), ANGELA: (kantistino).

Krome dum tiu evento ni disdonos la atestilojn al sukcesintoj de la Tutmonda Skriba KER-ekzameno okazinta en la urbo Tecámac pastintjunie.

**Notu bone!** Kiuj ne aliĝis al la 12a MEK, havos la rajton partopreni en la arta vespero pagante \$100.00 (cent meksikajn pesojn)

Dato kaj Loko: **18an** de novembro, “**Universidad de las Ideas**”

**Horo:** De la 17a ĝis la 19a 30 h. Bv. alveni al la loko almenaŭ 15 minutoj antaŭe.


**Partoprenu kaj invitu viajn familianojn, amikojn kaj konatulojn!**



## LIBROSERVO

Inter pluraj aliaj, en la libroservo de la 12a MEK vi trovos la sekvajn librojn.

Profitu! Aĉetu tie materialon sen pagi sendokostojn!



**Lingvistikaj aspektoj de Esperanto** estas verko por kiuj volas scii pli pri la lingvo ekde la scienca vidpunkto.  
De: John Wells  
Paĝoj: 76  
Prezo: 130 meksikaj pesoj.



**Esperanto. Curso del idioma internacional** estas lernolibro kun 18 lecionoj por hispanlingvanoj  
De: Miguel Gutiérrez A.  
Paĝoj: 118  
Prezo: 230 meksikaj pesoj.

**La arbo de la sciado** estas romano pri la sopiro al homa perfektigo.  
De: Pio Baroja  
Paĝoj: 222  
Prezo: 100 meksikaj pesoj.



**Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj**, unu el la plej famaj romanoj de la franca aŭtoro.  
De: Jules Verne  
Paĝoj: 208  
Prezo: 360 meksikaj pesoj.

